

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

Adolf Malík: NA NOVOU CESTU!

Druhý sjezd obránců míru ve Varšavě, který byl v rekordním čase rychle zorganizován po smutně proslulém zásahu britské vlády, která znemožnila pořádání kongresu v Sheffieldu, ukázal znovu, jak obrovská síla je dnes na straně míru. Všechny svobodomylné národy postavily se do řad bojovníků za mír. V těchto řadách jsou také esperantisté, ale ne všichni, a mnozí dokonce s výhradami. Také naše světová organizace UEA - Universala Esperanto-Asocio - se chovala a chová k světovému mírovému hnutí celkem pasivně, jako by tu nešlo o společnou věc všech lidí dobré vůle. Co je toho příčinou? Přísná neutralita i k boji za mír? Nebo vedení, které pěstuje esperanto pro esperanto a nepřináší iniciativu pro zapojení esperantistů celého světa do boje za uhájení míru proti válečným štvárcům v kapitalistických zemích?

Pokrokoví esperantisté v západních státech nejsou spojeni s takovým nemastným, neslaným jídlem, které dostávají z kuchyně UEA, protože to není ani ryba, ani rak. Nový člověk, pokrokový, ten si žádá jasné ano nebo ne. To musí žádat i každý esperantista. Jsem pro mír, tedy podporuji všechny akce, které jsou podnikány na obranu míru, a nestojím stranou, anebo jsem pro válku a souhlasím s tím, co dělají kapitalisté, a nebráním mír. Tedy ten, kdo nebrání mír, je pro válku, i když říká, že není. Nu, a brání naše UEA mír v tomto světovém dění nějak veřejně tiskem (plakáty, letáky, novinami, pohlednicemi, brožurami, nálepkami atd.), nebo filmem, přednáškami a konečně důraznými kongresovými resolucemi? Nic takového se neděje, ač finanční prostředky k tomu jsou. Proč ne? Pro onu neutralitu? Taková neutralita je špatná, protože uspává a ukolébává do klidu i takové esperantisty, kteří by rádi esperantem míru sloužili, protože tím zároveň slouží všem lidem dobré vůle.

Vystává tedy otázka, co dělat. Já říkám: dát se na novou cestu. Na cestu opravdových a upřímných bojovníků za mír. To znamená rozloučit se s UEA, ale také se SAT-em, který je kosmopolitickou organizací beznárodnostní, tedy jiného typu a též s jinými kosmopolitickými organizacemi, a založit mezinárodní ligu pokrokových esperantistů, kteří by pracovali v duchu proletářského internacionálního ruku v ruce se Světovým výborem obránců míru a všemi pokrokovými mezinárodními organizacemi, jako jsou SOF - Světová odborová federace, SFDŽ - Světová federace demokratických žen, SFDM - Světová federace demokratické mládeže, MSS - Mezinárodní svaz studentstva, MON - Mezinárodní organizace novinářů, a jinými. Ve spolupráci s těmito organizacemi by naše esperantské hnutí našlo své plné uplatnění, protože celým svým posláním bojuje za mír upřímně a houževnatě proti všem zrádcům míru.

Navrhují-li toto řešení, jistě tak nečiním z nějakého lehkomyslného rozkolnictví, nýbrž zkušenosti nás učí, že to budeme asi nuceni učiniti již také proto, že podobným organizacím, jako je UEA, která je příliš zřejmě ovlivňována reakční politikou imperialistů a titovštinou, náš pokrokový svět v lidových demokraciích, čítajíc v to SSSR, nevěří. Nevěří proto, že dosud neučinily nic na obranu míru a nadto svým neutralitním programem nahánějí své členstvo do vod kosmopolitických, tedy do vod světové reakce. To je naprosto jasné, a je na nás, abychom my, esperantisté v lidově demokratických státech zaujali správné stanovisko, nechceme-li esperantské hnutí v těchto zemích nadobro zlikvidovat. Došlo by k tomu určitě, kdybychom nadále zůstali v UEA, SAT-u a jiných kosmopolitických organizacích, nebo kdybychom nebyli vůbec v žádné mezinárodní organizaci, stojící na basi proletářského internacionálního. Jistě bychom se jednou rádi vrátili do UEA, kdyby tato organizace skutečně plnila úkoly bojovníků za mír a byla tu záruka, že nebude ani přímo, ani nepřímo sloužit válečné propagandě a rasovým i národním diskriminacím. Tato záruka tu prozatím není. Víte dobře, že v Anglii, v zemi tradiční demokracie, nesměli promluvit světoví obránci míru, protože v této zemi zemřela svoboda slova, zemřela demokracie, a dnes tam vládne dolar a policejní obušek. Vedení UEA je dozajista ovlivňováno touto skutečností, a proto nezbyvá, než rozhod.

Ano, vybudujeme světovou organizaci takovou, ve které se budou moci sdružovati všichni pokrovní esperantisté světa. V únoru 1951 bude v Číně ustaven celostátní svaz čínských esperantistů, který zajistí velmi posílí naše řady, ježto do UEA se zřetelem na svůj charakter nevstoupí.

Stanovy k nové světové organizaci pokrokových esperantistů máme již připraveny; odpovídají zcela duchu naší nové práce na poli esperantského hnutí, kdežto UEA a jiné organizace zkonserativněly a nevyhovují novému poslání člověka, t. j. dát všechny své schopnosti na obranu míru. Váleční štváči ohrožují lidstvo třetí, ještě hroznější válkou. Proto s úsilím tím větším musíme všichni pracovat pro mír a s politováním konstatujeme, že naše dosavadní světové vedení UEA odbylo stockholmskou výzvu v době 32. světového kongresu esperantistů v Paříži, planým povídáním o míru a nedalo v tomto směru ani sobě, ani svým členům závazků k lepší práci na podporu stockholmské výzvy.

I tak byl podán důkaz, že doba uzrála a že je nutno vytvořit novou světovou organizaci pokrokových esperantistů, která by splnila jejich požadavky a která bude pracovat se všemi pokrokovými složkami světa. Tím také nesmírně prospějeme esperantu v každé zemi, kde mír a pokojně budování socialismu je programem celého národa. Sám jsem přesvědčen, že se nám dílo podaří.

Adolf Malfk: SUR NOVAN VOJON!

La dua kongreso de la pacdefendantoj en Varsovia, kiu estis dum rekorde mallonga tempo organizita post la malĝoie fama interveno de la brita registaro, kiu malebligis okazigon de la kongreso en Sheffield, vidigis denove, kiom aĝanta forto staras hodiaŭ en fronto de la paco. Ĉiuj liberecon amantaj nacioj starigis sin en vicoin de pacobatalantoj. En tiuj batalinioj estas ankaŭ esperantistoj, sed ne ĉiuj kaj multaj eĉ kun rezervoj. Ankaŭ nia tutmonda organizaĵo Universala Esperanto-Asocio rilatis al la tutmonda pacmovado entute pasive, kvazaŭ ne temus pri komuna afero de ĉiuj homoj de la bona volo. Kio estas la kaŭzo? Strikta neŭtraleco eĉ koncerne pacbatalon? Aŭ gvidantaro, kiu flegas Esperanton por Esperanto kaj ne alportas iniciatemon por enigi esperantistojn de la tuta mondo en batalon por defendi la pacon kontraŭ militprovokantoj en kapitalistaj landoj?

Progresemaĵo esperantistoj en la okcidentaj landoj ne estas kontentaj kun tia manĝo negra. nerala, kiun ili ricevas el UEA-kuirejo, ĉar ĝi estas nek fiŝo nek kankro. Nova homo, la progresema, tiu postulas por si klaran jes aŭ ne. Tion devas postuli eĉ ĉiu esperantisto. Mi estas por paco, do mi subtenas ĉiujn agojn entreprenatajn por defendi la pacon kaj mi ne staras flanke, aŭ mi estas por la milito kaj konsentas kun tio, kion faras la kapitalistoj kaj mi ne defendas la pacon. Do tiu, kiu ne defendas la pacon, estas por la milito, eĉ se li asertas ne esti. Nu, kaj ĉu nia UEA defendas la pacon—dum tiu ĉi monda okazado tiel publike per preso (afiŝoj, flugfolioj, ĵurnaloj, ilustritaj kartoj, broŝuroj, glumarkoj ktp) aŭ per filmo, prelegoj, kaj fine per impetaj kongresrezolucioj? Nenio tia okazas, kvankam finacrimedoj por tio ekzistas. Kial ne? Pro tiu neŭtraleco? Tie'a neŭtraleco estas malbona, ĉar ĝi dormigas kaj enlulas en kvieton eĉ tiujn esperantistojn, kiuj volonte servus per Esperanto al la paco, ĉar per tio ili samtempe servas al ĉiuj homoj de la bona volo.

Ekestas do demando, kion fari. Mi diras: ekiri sur novan vojon. Sur vojono de efektivaj kaj sinceraj batalantoj por la paco. Tio signifas adiaŭi UEA, sed ankaŭ SAT, kiu estas kosmopolitisma organizaĵo sennacieca, do alitipa, kaj ankaŭ aliajn kosmopolitismajn organizaĵojn, kaj fondi internacian ligan de progresemaĵo esperantistoj, kiuj laborus en spirito de proleta internaciismo man'en mane kun Tutmonda Komitato de la Pacdefendantoj kaj ĉiuj progresemaĵo internaciaj organizaĵoj, kiaj estas Tutmonda Sindikata Federacio, Tutmonda Federacio de Demokratiaj Virinoj, Tutmonda Federacio de Demokratia Junularo, Internacia Asocio de Studentoj, Internacia Organizaĵo de Journalistoj kaj aliaj. En kunlaboro kun tiuj ĉi organizaĵoj nia Esperanto-movado trovas sian plenan aplikon, ĉar pro sia tuta misio ĝi batalas por paco sincere kaj obstine kontraŭ ĉiuj perfidantoj de la paco.

Se mi proponas tiun ĉi solvon, mi certe ne faras tion pro iu facilanima skirmemo, sed sperto instruas nin, ke ni devos tion fari ankaŭ tial ke al similaj organizaĵoj kia UEA, kiu estas tro videble influata de reaktia politiko imperiista kaj de Tito-ismo, nia progresema mondo en la popoldemokratioj, inkluzive USSR, ne kredas. Ĝi ne kredas tial, ĉar ili ĝis nun nenion faris por defendi la pacon, kaj krome pro sia neŭtraleca programo ili pelas siajn membrarojn en kosmopolitismajn ondojn, do en ondojn de la mondreakcio. Tio estas nepre klara, kaj estas nia vico, ke ni esperantistoj en popoldemokratiaj landoj ekokupu ĝustan starpunkton se ni ne volas Esperanto-movadon en tiuj landoj likvidi. Tio alvenus certe, se ni restus plu en UEA, SAT kaj aliaj kosmopolitismaj organizaĵoj aŭ se ni estus en neniu internacia organizaĵo staranta sur bazo de proleta internaciismo. Ni certe iam volonte revenus en UEA, se ĝi efektive plenumadus taskojn de la pacbatalantoj kaj se ekzistus garantio, ke ĝi nek senpere nek pere servos al militpropagando kaj al roraj kaj naciaj diskriminacioj. Tia garantio provizore ne ekzistas. Vi scias bone, ke en Anglujo, lando de tradicia demokratio, ne raĵtis ekparoli tutmondajn pacdefendantoj ĉar en tiu lando formotis libereco de parolo, formotis demokratio kaj hodiaŭ tie estras dolaro kaj polica bastono. UEA-gvidantaro certe estas influata de tiu ĉi realo kaj tial restas nenio krom disiĝo.

Jes ni masonas tutmondan organizon tian, en kiu povos kuniĝadi ĉiuj progresemaĵo esperantistoj de la mondo. En februaro 1951 estos en Ĉinio starigita asocio de ĉinaj esperantistoj, kiu certe plifortigos niajn vicajn, ĉar en UEA ĝi pro sia karaktero ne eniĝos.

Statuton de nova tutmonda organizaĵo ni jam posedas pretan, ĝi respondas tute al spirito de nia laborado sur kampo de esperantista movado, dum UEA kaj aliaj organizaĵoj iĝis konservativaj kaj ne respondas al la nova misio de la homo t. e. doni ĉiujn siajn kapablecojn por defendi la pacon. La militprovokantoj minacas la homaron per tria, ankoraŭ pli terura, milito. Tial kun impeto ankoraŭ pli granda ni ĉiuj devas, labori por la paco; kaj kun bedaŭro ni konstatas, ke la ĝisnuna UEA - gvidantaro dum la 32-a universala kongreso en Parizo fuŝtraktis la Stockholman alvokon per senfrukta babilado pri paco kaj ne devontigis sin pli bone labori por subteno de la Stocholma alvoko.

Do ankaŭ tiel estis donita pruvo, ke la tempo maturiĝis kaj ke necesas krei novan tutmondan organizon de progresemaĵo esperantistoj, kiu plenumus iliajn postulojn kaj kiu laboros kun ĉiuj progresemaĵo komponentoj de la mondo. Tiel ni ankaŭ tre helpos al Esperanto en ĉiu lando, kie paco kaj paca konstruado de socialismo estas programo de la tuta nacio. Mi mem estas konvinkita ke nia verko sukcesos.

Laŭ la permeso de la Inform-ministerio el la 5-a de januaro 1951 nia gazeto aperados en 1951

sur 12 paĝoj 12 foje dum la jaro.

Sekve de tio la dua numero estos 16 paĝa. Malgraŭ tio la kotizo restas senŝanĝa.

*

Film o sjezdu ĉs. esperantistů v Brně zapůjčí vám zdarma naše kancelář. Film je 8 mm, trvá 15 min.

*

Zájemci o zkoušky z esperanta hlaste se u tajemníka zkušební komise JUDr. Tomáše Pumpra, Verdunská 8, Praha 19.

Příkládáme složenku k úhradě členského příspěvku na rok 1951. Základní členský příspěvek jest Kčs 100,— za kalendářní rok; příspěvek pro vojáky, učně a studující Kčs 50,—, pro rodinné členy Kčs 25,—. Každý člen, kromě rodinného, dostává časopis zdarma. Propagační předplatné na adresu do ciziny, nám udanou, jest Kčs 50,— za ročník a přijímá se zásadně na dobu kalendářního roku.

Členové místních odboček informujte se na výši členského příspěvku na příští klubové schůzi. Svazový příspěvek platíte pak pouze prostřednictvím svého klubu (odbočky).

Místní odbočky pošlete nám ihned seznam členů, kterým máme v r. 1951 časopis zasílati. Příspěvky pak zašlete po vybrání. Ačkoliv rozsah Esperantisty jest v r. 1951 zvětšen, nezvyšujeme příspěvek. Snažte se proto o zvýšený počet členů.

EL LA TRADUKOJ DE RUD. HROMADA

Ant. Sova: **KIU TAŪZIS AL VI HAROJN?**

Gardenon mian venis ŝi
dum ĉesis flori ĉiu flor'.
Ĉagrena vagabond' — la Sun' —
al horizont' sin klinis for.
»Ho tre malfrue!« diris mi.
Sur kanoj velkas suno-bril',
en mi jam mutas ĉiu gaj',
en herboj ĉesis birda tril',
herbej' parfumas ete nur
kaj akvojn kovras jam obskur'
kaj pasas plu de ombroj kur'
kaj ĉio vana nur konkur' —
al fora land' mi pretas jam,
al ia verda insular',
mi hisas flagojn sur la mast'
kaj blankajn velojn en ŝnurar'.
Printempe mi atendis vin...
En horizonto zumis blu'.
El lumo kordojn streĉis mi
por vian voĉon kapti plu.
Vi kie tiam vivis, diru?
Trans kiuj malproksimaj maroj?
Vi kie vivis majajn tagojn?
Kaj kiu taŭzis al vi harojn?
Kaj kie kantis varmaj noktoj
en vian malfermitan domon?
Sopiris vane mia animo,
angora, ne aŭdante sonon.
Kaj nun, dum mi eĉ ne pensetis
kaj ĉion tie ĉi forĵetis
kaj nur por naŭi foren pretis
vi venas por ĉe mi vegeti?
Por ni jam ne plu pompas sun',
montar' ne kantas nun.
Por ni herbejoj sen odor',
por ni sen kantoj nia mar'.
Mi iras for kaj en suflor'
aŭtuncjn aŭdas fe-fanfarojn.
Mi iras serĉi Novan Regnon.
Sed kiu taŭzis al vi harojn?

S. K. Neumann: **KANTO VENDREDA**

Mia popolo! per terur'
ili intrudu ĉion,
tenu nur koron en la pur',
estas ĝi via firma mur',
ruzo nur venkus nacion.
Nia popolo! via kred'
je l' harmoni' homara,
diru ne estas por aĉet',
vi ĝin defendos sen paŝ-ced'
dum kanonad' barbara.
Scias vi vivi en esper'
pri lando promesita,
idoloj falos al la ter',
nur ĝi eliros el danĉer'
al la sanktej' celita.
Havas vi amon al la lum',
lumo sanigas,
ĝin ne detruos ia um',
ho vivu lum', ho vivu lum',
obskuron lum' timigas.
Timas obskuro kaj morto ĝin,
amu, esperu, fidu,
fieru pri la viv-destin'
kiel tili' en kamp' aŭ monta pin',
la fremdan ne avidu!

Karel Toman: **AŬTUNO**

Vesperoj sorĉaj! En nebul' arĝenta
de luno-lum' fandiĝas neĝ' silenta
kaj muel-radoj kantas ĉe l'rivero.
De l'verdaj radoj elegia ĥoro
krepuske kantas. Kial la doloro
animon kaptas, premas ĝin al tero?
Sur miaj kampoj ankaŭ spikoj gemis
kaj dum tagmezoj suna brilo tremis
sur miaj kampoj, dancis en abund'.
Por mia gren' la radoj ne susuras,
sur stoplo-kamp' de iluzioj kuŝas
mokantaj ventoj nur... jen mia vund'.

Fráňa Šrámek: **VIRINO KAJ LA UNIKA VIR'**
(Žena a jediný)

L'unua? Ne! Li scias ĝin,
ĝi eble ne doloras lin.
Jam dua? Tria? Lia vol'?
Rikolti min laŭ vira rol'!
Vi manoj, eĉ ne scias ĝin,
ke lacas vi sur mia sin',
vin lia vido kisis jam,
jen ĉiam la komenc' de l'am'.
Vi manoj, se vi volus nur,
ho k'a estus ĝi plezur!
Okulojn kovrus mi per man',
en rev' parolus pri la am':
Vi venis do, unika vir'!
Pasadis horo! de sopir',
vi estis ie en proksim'
kaj eble aŭdis voki min.
Vi venis! Fluuj larmoj cent,
demandis mi al ĉiu vent',
al ĉiu ondo petis mi
rakonti al vi ĉion ĉi.
Maten' sopiron sendis for
por trovi vin en iu hor',
vespere venis ĝi sen vort',
en ĉiu nokt' ĝin trafis mort'.
Kaj post la mort' je l'centa foj'
okul' fermiĝis en malĝoj',
en tombo nur mi sentis min
kun blankaj rozoj sur la sin'.
Jen pordo-knar' kaj paŝo-bru',
ankoraŭ paŝ' kaj paŝo plu,
li estis nur en malproksim'
kaj fajro jam ekkaptis min.
Mi kuŝis jam en tomboj cent,
sed kuris mi tuj sen prudent',
piedoj eĉ jam lacas nun,
ridetu al mi, mia sun'!
Ridetis vi, sed kia rid'!
vi prenis min, sed kia pren'!
Alie mi prezentis ĝin,
eĉ en mensog' ne trompis vin.
Imagu: blanka knabinet';
ŝi havis florojn en korbet';
sin donas ofte en sopir',
la florojn nur al unu vir'.
Moku pri l' eta knabinet',
plej multe pri la flor-korbet'.
L'unika for sur voĵ' sen fin',
l'unika vir' ne trovas min.

KRONIKO ENLANDA

Nia Asocio eksiĝis el UEA kaj decidis fondi Internacian Ligon de Progresemaĵoj Esperantistoj (ILPE). Nia prezidanto Adolf Malik invitis Asocian estaron kaj ĉiujn regionajn perantojn al kunveno la 30-an de decembro 1950 je la 18 h. en Praha en kafejo Arco. Ĉiuj invititoj ricevis kun la invitilo artikolon de Ad. Malik *Sur novan vojon*, kiun ni enpresas ĉeĥ- kaj esperantlingve kiel fruntartikolon en tiu ĉi numero. La kunvenon ĉeestis kompleta estraro (ankaŭ prezidanto de nia slovaka sekcio Slovaka Esperanto-Societo Paŭlo Rosa), kelkaj pluaj membroj de la komitato kaj regionaj perantoj aŭ iliaj anstataŭantoj el Bratislava, Brno, Děčín, Hradec Králové, Karlovy Vary, Liberec, Olomouc, Pardubice, Plzeň, Poprad, Praha, Trenčín, Trnava, Turč. Sv. Martin. Regionaj perantoj el Ostrava kaj Gottwaldov konfirmis telegrafe sian principan konsenton kun la proponoj. La kunvenon prezidis Ad. Malik. Li detale klarigis argumentojn diritajn en sia artikolo. Poste ĉiuj ĉeestantoj diris siajn opiniojn, en kiuj ĉiuj konsentis kun ambaŭ proponoj akcentante nepran neceson aktive partopreni en porpaca batalo sur bazo de la Stockholma rezolucio. Ĉiuj konsentis pri grandaj meritoj, kiujn UEA akiris organizante nian movadon. O. Ginz legis detalan leteron de Jar. Šustr, nepovinta ĉeesti pro profesia urĝa okupo, en kiu li resumas la meritojn de UEA, precipe kuraĝan faron de Hans Jakob, kiu en 1939 en organo de tiama UEA protestis kontraŭ okupacio de nia lando fare de Hitleranoj. O. Ginz ankaŭ prezentis opiniojn de O. Skleňnička, nepovinta ĉeesti, kiu same trovas necese eksiĝi el UEA kaj krei novan progreseman asocion; li pensas, ke per tiu sinteno ni povos multon helpi al la movado en popoldemokratiaj landoj kaj en USSR. En diskuto estis ankaŭ dirite, ke nuna UEA kaj tiu de Hodler, Privat, Hans Jakob esence diferencas. Poste prezentis A. Ozábalová en nomo de E-rondeto ĉe Z. K. ROH en Trnava proponon, ke ni eksiĝu el UEA la 31-an de decembro 1950. La propono estis akceptita de 24 voĉoj, kontraŭ voĉdonis neniu, sindetenis 6. estis unuanime postulite, ke la Centra Komitato klopodu, ke ĝi baldaŭ ricevu permeson sendi la kotizojn al UEA, kiujn ni ĝis nun havas sur konto.

Poste estis diskutata projekto de la statuto, paragrafo post paragrafo, kaj estis interkonsentitaj diversaj ŝanĝoj en la teksto. Tiu statuto-projekto estos prezentita al fondanta kongreso de Internacia Ligo de Progresemaĵoj Esperantistoj kunvokota al Praha en 1951.

Paragrafo pri celo kaj taskoj de la ILPE tekstas en la aprobita projekto jene:

1. Batali por paco, defendi kaj disvastigadi amikecon kaj kunlaboradon inter nacioj helpe de laŭvera kaj honesta esperantlingva informado per parolo, preso, radio kaj filmo. Batali kontraŭ disvastigado de militpsikozo kaj militpropagando, kontraŭ propagando de faŝismo en iu ajn formo, kontraŭ disvastigado de nacieca kaj rasa malamo kaj kontraŭ kreado de internacia streĉeco per iu ajn formo.

2. Propagandi kaj disvastigadi Esperanton en amasaj organizaĵoj kaj en internacia forumo sur bazo de proleta internaciismo. Zorgi pri oficiala enpenetro de Esperanto en kongresojn, konferencojn, preson, filmon, radion, lernejojn kaj simile.

3. Ĉiurilata helpo por protekti rajtojn de subpremataj nacioj kaj de naciaj minoritatoj en spirito de proleta internaciismo. Ŝirmo de esperantistoj en la tuta mondo persekutataj pro tio, ke ili batalas por la paco, progreso, justeco, libereco kaj nacia sendependeco.

4. Ŝirmi ĉiujn rajtojn de progresemaj esperantistoj batalantaj kontraŭ kosmopolitismo de iuj esperantistaj organizaĵoj, ĉar kosmopolitismo kontraŭas interesojn de vastaj laborantaj amasoj.

5. Plifaciligi personajn kaj korespondajn rilatojn de

progresemaĵoj esperantistoj diversnaciaj kaj interŝanĝon de kulturaj valoroj.

Estos starigita komisiono, kiu preparos fondon de la Ligo kaj kunvenigon de la fondanta kongreso. Provizore funkcios por tiu celo nia oficejo en Praha II, Malá Štěpánská 7, al kiu tuŝnu sin ĉiuj interesatoj precipe el fremdlando.

Helpo de ĉeĥoslovakaj esperantistoj al japanaj pacobatalantoj arestitaj de la reaktia japana Joŝida-registaro. En malproksima oriento amerikaj imperiistoj kune kun reaktia japana registaro konstruas kontraŭ popoldemokratiaj ŝtatoj Aziaj kaj kontraŭ USSR militbazojn en Japanio, kies loĝantaro tiom multe suferis per militiro kontraŭ Ĉinio, per Hiroŝima kaj Nagasaki. Sed la japana popolo forte instruita per la amasbuĉado nenial volas subteni iun ajn militon. Ĝi klopodas nenigi imperiistajn intrigojn, en la tuta lando multiĝas strikoj, la laboristoj rifuzas fabriki armilojn kontraŭ Koreo, la transportistoj malfaciligas transportojn, spite malpermesoj okazas grandaj demonstracioj kontraŭ militpreparoj, por sendependeco de la lando kaj por forigo de la reaktia registaro. Kiel kreskas tiu batalo por libereco, tiel kreskiĝas la reaktio sian teroron, ĉar ĝi volas almenaŭ ankoraŭ por tempeto konservi sian bonfarton. Ĝi sendas la nekontentulojn en arestejojn, sendungigas komunistojn kaj tiujn kiuj kun ili simpatias.

Sciante tion decidis esperantistoj en Plzeň kune kun Societo por kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj al Oriento helpi al familioj de la arestitaj pacobatalantoj japanaj. Ili decidis sendi al 25 el ili, kies adresojn liveris japana organizaĵo »Laborista kaj kampista helpo en Tokio« (Nippon-Rono Kyuen Kai) po du kestetoj de bonkvalitaj nutraĵoj, do sume 50 kestetojn. Ĉiu kesteto enhavis varojn en prezo ĉ. 1200 Kčs. La bezona mono estis kolektata precipe de s-o Rudolf Burda, kiu faris serion de prelegoj pri la samtempa situacio en Japanio laŭ informoj akiritaj helpe de Esperanto. La prelegoj okazis en diversaj ne-esperantistaj societoj kiel tiuj de Komunista Partio, Junulara Asocio, Sokol k. s. kaj la preleginto kolektadis ĉe tiu okazo donacojn por tiu celo, batalema kaj helpema egale. Ankaŭ diversaj esp. organizaĵoj monsubtenis tiun agadon, ankaŭ Centra Komitato Asocia. Tiel kolektiĝis respektinda bezona sumo.

Financa ministerio kaj Regiona Nacia Komitato donis en aŭgusto permeson por eksporto de la nutraĵoj. La ZKD en Plzeň liveris unuakvalitajn varojn. La 17-an de novembro la kestetoj estis kontrolitaj de la dogana oficejo en Plzeň kaj estis dum kvar tagoj ekspoziciataj kaj montritaj al funkciuloj de organizaĵoj, ebligintaj al s-o Burda fari la prelegojn kaj kolekti la monon. Poste ili estis forsenditaj al la japanaj adresoj po partoj. Oni nenion publikigis antaŭ forsendo de la varoj, por ke la reaktia registaro japana ne povu malhelpi al la adresatoj akcepti la donacetojn.

Ni estas konvinkitaj, ke tia sendaĵo estas tre efika manifestiĝo de internacia solidareco kontraŭ militinstigantoj kaj ke ĝi vekos inter laboranta japana popolo simpatiojn kun nia respubliko, refutos kapitalistajn kalumniojn kaj kuraĝigos la japanajn kamaradojn en ilia malfacila batalado kontraŭ faŝismo kaj milito. Ĝi estas unua helpo de ĉeĥoslovakoj al japanaj pacobatalantoj, kaj ĝi estas iniciatita kaj efektivigita de esperantistoj.

Kiam ni ricevos sciigojn pri resonado de tiu ĉi faro, kiun peris japanaj esperantistoj kunlaborante kun la japana »Ruĝa Helpo«, ni raportos pri tio detale.

El la ĉeĥaj gazetoj skribis pri tiu afero Rudé právo en Plzeň la 23. XI. 1950. La uzina semajna gazeto Škodovák la 5. XII. 1950 »danke al niaj esperantistoj« publikigis bildojn de du japanaj afiŝoj kaj artikolon »Batalo kontraŭ kapitalistoj estas batalata ĉie egalmaniere«.

S-o R. Burda, laŭ kies sciigoj ni verkis tiun ĉi raporton, kaj liaj kunlaborintoj akceptu gratulon kaj dankon pro tiu ĉi iniciato kaj la modele farita laboro. Jen ekzemplo de kunlaborado internacia!

RICEVITAJ LIBROJ

Bratři Filipů Velký slovník esperantsko-český a česko-esperantský. I. Granda Vortaro Esperanta-Ĉeĥa. Verkita de Prof. Jan Filip kaj Karel Filip. 1948. Společenské podniky p. nár. správou, Přerov. 446 paĝoj 12×18 cm. Bindita. Prezo 200 Kčs. — II. Granda Vortaro Ĉeĥa-Esperanta. Verkita de Prof. Jan kaj Karel Filip. 1949. Společenské podniky p. nár. správou. Přerov. 654 paĝoj 12×18 cm. Bindita. Prezo 390 Kčs. — La unua eldono de granda vortaro Esp-ĉeĥa de Jan Filip aperis en 1930 en la sama eldonejo. Nuna apero de tiuj ĉi dikaj volumoj povas esti nomita kiel evento epokfara por uzado de la lingvo inter la ĉeĥaj esperantistoj. La unua parto estas multe pli detala ol la unua eldono antaŭ la 17 jaroj. Kaj la dua parto, ĉeĥa-esperanta, superas ĉiujn atendojn pro sia amplekso. En la unua parto estas enlistigitaj ĉiuj esperantaj vortoj, kiujn la aŭtoroj kolektis kaj ĉiuj, kiujn ili ankaŭ mem derivis, kaj por kiuj ili ofte trovis bonajn kaj iam spritajn ĉeĥajn tradukojn. Tiu ĉi materialo estas transprenita en la duan parton, ĉeĥan-esperantan, kaj estas plimultigita, ĉar estis enlistigitaj multaj vortoj ĉeĥaj, eĉ vortoj maloftaj kaj nekutimaj. Oni trovas tre multajn nomojn geografiajn, de regionoj, landoj, nacioj, urboj, estas tre multaj nomoj de bestoj kaj vegetalaj, la uzanto trovas konsilon en preskaŭ ĉiu okazo.

Urĝa bezoneco de tia vortaro estas pruvita per fakto, ke ambaŭ volumoj estis disvenditaj dum kelkaj monatoj post apero, estas riceveblaj nur kelkaj ekzempleroj.*) Ni raportas pri tiu grava eldono nur nun, ĉar la eldonejo ne povis sendi recenzan ekzempleron eĉ al ni. Certe baldaŭ estos postulata dua eldono de la ambaŭ volumoj. Tial ni aldonas kelkajn rimarkojn, kiujn povus la aŭtoroj prikonsideri.

La esperanta-ĉeĥa parto indikas ĉe la vortoj ankaŭ ilian signifon, en kiu ili estas uzataj malĝuste, ekz. »absolvi« absolvovali aŭ »termino« lhŭta, sed la ĉeĥa-esperanta parto tendencas al normigo de ĝusta uzado kaj tial ĝi »enerarige« tradukas »absolvent« »finstudinto, frekventinto, diplomito«; sed verŝajne pro forgeso restis »absolvovali absolvi« sen plua klarigo. Same ĝuste estas indikita »termin limtempo, tempolimo; (výraz) termino«. Generale mi rekomendus pli zorgan atenton al Plena Vortaro. Ĝi ja estas akceptata ĝenerale kiel normo. Do en vortaro tiom detala kiom Filip-vortaro radikoj ne enestantaj en la PV devus esti indikitaj. Kaj kiam temas pri radikoj oficiala devus en la ĉeĥa-esperanta volumo enesti sole tiu ĉi. Kial skribi »to(a)sto«, kiam oficiala vorto estas tosto. Kial »Keramiko«, kiam ekzistas oficiala ceramiko? »Černý kašel« estas kokluŝo, ne tusego. Recitovati báseň estas ĉiam deklami, reciti signifas odřikávatí ekz. lecionon. »Brutto« ne estas uzata kaj certe estas neuzinda. Komerca Vortaro de Kreuz kaj Mazzolini el 1927 devus esti rigardata kiel aŭtoritato; ĝi proponis uzi deviso apud devizo; eĉ se PV ankoraŭ ne enlistigis ĝin, tamen ĝi estas provinda kiam ekzistas raketo-raketo, kurso-kurzo k. s. Sírnik estas sulfido, sulfito estas sířičitan. Kyselina sírová neniam povas esti nomita »sulf(hidr)ika«, kyselina sířičná ne ekzistas. »Civilista« estas nepre civilulo, radikoj »civil-« estas ja adjektiva. Vytrubovati oni ofte legas distrumpeti. Diri »deficit« en senco ztratit, prodělati estus nefacile komprenebla; se oni nepre volus krei verbon el deficit- ĝi signifus »la bilanco deficitas« por esprimi ĉeĥan frazon ankaŭ ne tro kutiman »bilance je deficitní«. Ztrátová bilance estas deficitita bilanco. En »Muzika terminaro« el 1944 estas tre bona termino por »komorní hudba«: ĉambra muziko; en la vortaro ĝi ne estis transprenita; mi donas tiun detalon por montri kiel oni devus esplori kaj uzi fakajn terminarojn. Ankaŭ mi ne komprenas, kial apud Fundamenta »cinabro« estas

*) La ĉeĥa-esperanta vortaron nia Librovendejo povas liveri. La Esp-ĉeĥa estas disvendita.

donita neuzata »vermilono«. Kaj diri en vortaro por blizna »stigmato« anstataŭ stigmo de P V estas simple eraro.

Ni kolektis kelkajn tiujn ekzemplojn por montri, kio estas korektenda en nova eldono. Sed ne por vidigi, ke la verko meritas riproĉojn. Kontraŭe. Mi ja jam estas dirinta, ke ĝia apero estas epok-fara, kaj la aŭtoroj meritas laŭdojn kaj dankojn pro ilia sindediĉo al la vortfara laboro kaj pro ilia formika klopodado pri verko tiom ampleksa. Precipe meritas laŭdon ilia klopodado, ke la uzanto de la vortaro estu atentigata pri diversaj sencoj de la vortoj kaj pri sencouancoj; ili dediĉis al tio grandan atenton. Ankaŭ grandan laboron ili dediĉis al strebado pri kompletado de la vortaroj. Precipe en la dua volumo enestas multaj vortoj tre maloftaj en la ĉeĥa lingvo. Grandan zorgon ili dediĉis al nomoj de animaloj kaj vegetalaj, nun oni povos kontroli reciproke tiujn nomojn kaj kompari la nomojn vulgarajn kun la fakaj. Ankaŭ nomoj de urboj. La tasko de la aŭtoroj estis malfaciligata pro abundeco de la ĉeĥlingva materialo tradukinda. Ili finredaktadis sian verkon dum tempo de profundaj ŝanĝoj sociaj. Tamen estis bezone aldoni al la libro apartan 4-paĝan liston de novepokaj terminoj, verkita de Jar. Mařík.

Gratulon meritas ankaŭ la presejo Oma. kaj korektantoj de la presprovaĵoj dum la preso, preseraroj estas preskaŭ netroveblaj. En la ĉeĥa alfabeto ni preferus enlistigon de supersignitaj konsonantoj kiel apartaj literoj, laŭ normo starigita en Pravidla českého pravopisu jam en j. 1941.

Por Esperanto-movado inter ĉeĥoj signifas la du volumoj de fratoj Filip faron, kiu apogas la praktikan uzadon de la lingvo laŭ grado ĝis nun nespertita. La aŭtoroj akceptu dankon de ĉiuj esperantistoj pro tiu ĉi verko tiom bezona.

Marie Majerová: Urbo sub signo de fajro. Tradukis Božena Vlčková. Připravil ONV Kladno IV. ref. 1950. Pražské nakladatelství. 28 paĝoj 15×22 cm. Prezo 30 Kčs. — Eminentia ĉeĥa verkistino Marie Majerová verkis en 1941 poezioplenan priskribon de la Kladno-regiono. En tiu malgaja tempo de la Hitlerana okupacio la poetino antaŭsentis, ke la karba subtera riĉaĵo kaj la feruzinoj kun la ekzercitaj cerboj kaj manoj de la laboristoj estas unu el la gravaj garantioj, ke estonteco de la ĉeĥa popolo estos pli bona ol la tiama hontiga estanteco. »Sed la lernejoj en Kladno ne estas donaco sole el la moderna tempo. Ĉu okazis iam en Bohemia, ke membroj de kelkaj familioj, kunvenintaj por komunuma administrado, ne zorgis tiuj pri lernejoj?« La rakontado pri la urbo Kladno kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas plena de tre trafaj metaforoj, sprito fajreras ne unu fojon. Kaj la leganto daŭre sentas la kredon de la aŭtorino, ke la riĉeco de la urbo ne estas rezulto de blindaj naturfortoj sed akiraĵo kreita kaj kreata per manoj kaj intelektoj de la laboristoj. Ŝi jam tiam antaŭsentis, ke savo venos en tiu momento, kiam la laborista klaso prenos la regadon en siajn manojn. Kvankam ĝi ne estas novelo, vi legos tiujn 26 paĝojn kun streĉita atento.

Traduki tiun ĉi lingvaĵon ne estis tasko facila. Tial ni gratulu al la tradukintino pro verko, kiu meritas laŭdon senrezervan.

La libreton preparis por eldono Distrikta Nacia Komitato en Kladno. Ĝi estas la unua fojo, kiam administra instanco eldonigis beletran verkon esperantlingvan. Ĝi vidigis lokan patriotismon de la plej bela flanko kaj larĝvidan decidemon samtempe. Ĝia kultura departemento akceptu dankon pro la tre saĝa kompreno de sia funkcio. Kaj niaj legantoj zorgu, ke tiu ĉi libreto estu legata ekster niaj landlimoj. Ĝi diros al fremda leganto pli ol multaj propagandaĵoj.

Dro W. Manders: Interlingvistiko kaj Esperantologio. J. Muusses Purmerend, Nederlando. f. 225. 78 paĝoj 16×24 cm. — La libro konsistas el du partoj. La »Interlingvistika parto« difinas sintenon de esperantistoj al interlingvistiko, priskribas la naturalismon de Wahl kaj Jespersen

kaj tiun de IALA. Estas tie donitaj tre instruaj ekzemploj de paralelaj tekstoj en Occidental kaj en Novial kaj tekstoj el la kvar »Variantoj« de IALA. La »Esperantologia parto« deklaras kiel taskon de esperantologio precipe komparajn studojn inter Esperanto kaj la ceteraj projektoj de la planlingvoj, ne sole esploron de Esperanto unusola. La aŭtoro donas mem tre belan ekzemplon de tia esploro. Li komparas uzon de »ye« en Occidental kaj de »je« en Esperanto, uzon de la prepozicio »de«, prepoziciajn esprimojn anstataŭ adverboj, prepoziciojn sekvatajn de infinitivo en Occidental kaj en Esperanto. Li trovas, ke Occidental uzas »ye« pli ofte ol Esperanto »je«, ke funkcio de »de« en Occidental estas preskaŭ same nedifinebla kiel tiu de »ye«, ke Occidental preferas prepoziciajn esprimojn ol adverbojn, precipe kun prepozicio »in«, ke Occidental uzas en multe pli granda amplekso prepoziciojn sekvatajn de infinitivo. Estas tre instrue kaj agrable legi tiun ĉi libron de la klera aŭtoro de la nederlandlingva Vijf Kunsttalen (Kvin artefaritaj lingvoj) el j. 1947. Kaj lia konsilo, ke la esperantistoj pli studu la verkojn pri ĝenerala interlingvistiko estas plene aprobinda. Li ankaŭ pravas asertante, ke evoluo de Esperanto ne estas tiom »natura«, kiel ni plej ofte kaj sufiĉe facilanime proklamas. Eĉ la naturaj lingvoj ne evoluas spontane.

Ni tre konsilas al ĉiuj samideanoj legi tiun ĉi libron. Ni konsentas kun ĉiuj asertoj de la aŭtoro. Sole pri unu ni dubas. Li tro taksas la influon de universitataj aŭtoritatoj kaj de profesiaj lingvistoj sur katedroj altlernejoj por solvo de interlingvistikaj problemoj. Laŭ ni multe pli decidus la popolo, la amasoj. Rememoru, kiel facile la universitataj profesoroj (en sia meznombro kaj mezkvalito) adaptiĝas volonte al ĉiu reĝimo. Rememoru, kiom multaj germanaj profesoroj aliĝis sen konscienciproĉoj al Hitleranoj. Ni ne forgesu, ekzemple sintenon de fizikisto Stark rabanta posedaĵojn restintajn post liaj judaj kolegoj, eĉ la genian Planck! Ŝajnas, ke la avangardo de progreso vivas en aliaj tavoloj sociaj.

Legi tiun ĉi libron mi rekomendas ankaŭ pro ĝia eminenta lingvaĵo. En unu ĝia ĉapitro oni serĉas objektivajn kriteriojn pri korekteco de esperantaj tekstoj kaj konstatas, ke ili estas malfacile troveblaj. Lingvaĵo de Manders en lia verko estas ne sole korekta sed bela, tre plaĉa. Tiu kapableco klare kaj strikte esprimi siajn ideojn estas certe unu el la plej gravaj signoj de lingva korekteco.

Jrclibro de UEA 1950. Dua parto. Nur por uzo de membroj. Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. 48 paĝoj 11×16 cm. — En tiu ĉi kajero ne enestas kutimaj informoj pri aldonoj kaj ŝanĝoj en la delegitaro, ĉar Jarlibro 1951 aperas jam en januaro. Sed enestas tre interesa Raporto de la Estraro el la 1-a de julio 1950 kaj ĝia aldono pri »Oficialigo de Esperanto«, kiu donas koncizajn informojn el 22 landoj pri diversaj faroj registaraj, kiuj signifas iaspecan agnoskon de Esperanto. La tre bele presita broŝuro enhavas ankaŭ duan parton de la Marista terminaro de Peter Clisold; ĝi estas detala kaj en la fino ĝi enhavas liston de terminoj kun tradukoj en la angla, franca, germana, hispana. Tiaj tradukoj estas por la terminologiaj celoj tre utilaj.

Francisco Valdomiro Lorenz: Esperanto sem Mestre. 4-a edição. Revista e aumentada pelo Autor. (Do 22 ao 26 milhar.) 1950. Federação Espírita Brasileira. Rio de Janeiro. 240 paĝoj 14×18 cm. — La kvara eldono de tiu ĉi lernolibro de nia samlandano enhavas en 17 lecionoj kompletan gramatikon klarigatan portugallingve kun multaj trafaj ekzemploj. Ĉiu leciono finas per alineo »Senpera metodo« enhavanta demandojn pri la teksto donita en la leciono. La 18-a leciono enhavas portugallingve la 16 regulojn de Esperanto. Poste sekvas »Ŝlosiloj de la ekzercoj«, tio estas tradukoj de la portugalaj aŭ esperantlingvaj tekstoj el la ekzercoj, por ke la studento sen instruisto povu mem kontroli sian laboron. En la fino de la libro estas mallongaj vortaroj E-portugala kaj portugala-E. Aparte laŭdan mención me-

ritas multaj ekzemploj donataj en la ekzercoj pro ilia simpleco kaj korekteco. En piednoto sur ĉiu paĝo estas donita unu proverbo aŭ sentenco. Ili tre plaĉis al mi, kaj ili tre utilis al la studento, kiu lernante ilin parkere akiras vortprovizon, ne-banalajn parolturnojn kaj popolan saĝecon samtempe. Kaj ni finu per saluto al nia maljuna samideano, kies aktivecon pravas tiu ĉi kvara reeldono de lia lernolibro.

M. A. Teixeira de Freitas, direktoro de la departemento de Statistiko kaj Publika Sano. (Traduko de Prof. Porto Carreiro Neto.) »La erao de la tutmondeco« kaj Esperanto. Rio de Janeiro. Presejo de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. 1948. 26 paĝoj 19×27 cm. Havebla por 5 respondkuponoj ĉe Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República, 54º, Rio de Janeiro. — Ĝi estas traduko de parolado, kiun faris la aŭtoro laŭ invito de la Brazila Ligo en aŭditorio de la Militista Klubo la 16-an de junio 1948. Li estas konvinkita, ke metodo plej taŭga por oficialigi Esperanton estas ĝia uzo en oficialaj publikigaĵoj koncernantaj plurajn naciojn, kiel tion jam faris kaj faras Brazila Statistika Ofico. »Kiu konsultos la Bultenon Memorigan de la unua jarcento post la malfermo de la brazilaj havenoj al la internacia komerco, publikigita en 1908 aŭ la Resumon de la Statistika Jarlibro de Brazilo el 1947, tiu vidos, kiel utila, facila kaj entuziasmiga estas tiu tiel simpla iniciato.« Certe la historio alte taksos tiun ĉi pioniran iniciaton de Brazilo. La aŭtoro akceptu dankon pro siaj kuraĝaj asertoj kaj la tradukinto akceptu gratulon pro la tre bona traduko de teksto iam patosplena.

La konsumkoopero kaj la ekonomia vivo de Svedujo. De Thorsten Odhe, direktoro de la Internacia Koopara Alianco. 20 paĝoj 12×18 cm. — Broŝuro el 1949 kiu tre klare priskribas disvolvon de la konsumkoopero en lia lando kaj akcentas la servojn, kiujn ĝi donas al la ekonomia vivo de lia lando kiel tuto. La svedaj konsumsocietoj havis en 1948 sume 905 000 membrojn. Ĉar unu familion reprezentas ordinare nur unu membro, tiu cifero respondas al unu triono de la sveda popolo, se ni supozas, ke unu familio konsistas el kvar personoj.

Tra la ventego. Elektiita verkaro de Hristo Smirnenki. Traduko el la bulgara originalo. Eldonis Bulgara Esperantista Kooperativo 1950. Tradukis Assen Grigorov, Atanas Lakov k. a. Broŝurita 80 paĝoj, prezo neindikita. — Tiu ĉi verko aperis jam 1931. La nuna dua eldono estas reviziita kaj kompletigita. Ĝi enhavas 27 poemojn kaj du mallongajn prozojn.

La aŭtoro, juna entuziasma komunisto, laŭ sia literatura testamento kaj persona sorto tiom simila al nia Jiří Walker, mortis 1923 je tuberkulozo neatinginte 25-jaran aĝon. La lerte esperantigitaj specimenoj de lia poezio permesas imagi la esprimovon de la versoj, kiujn amas kaj parkeras — laŭ aserto de la antaŭparolo — la bulgaraj laboristoj. En ili ĉiam denove kaj aliforme pentriĝas sangoplena vizio de la mond-disfalo sub la impeto de la fina revolucio. Jen unu strofo el la unua poemo, kiu donis la nomon al la tuta kolekto:

Mi viĉos la majestan ŝturmon de la sklavo,
mi aŭdos tondron skui kun aŭdac'
la dormon pacan de la plac'
kaj portas ruĝan profetaĵon ravan
al la premita homa gent',
rompinta jugon de jarcent'.

Kortuŝa estas La flava gastino, en kiu antaŭ la okuloj de la leganto juna tabak-laboristino mortas je tuberkulozo.

La lingvo estas senriproĉa, la formo de la versoj pravas traduk-rutinin. Kaj tamen ni ne povas alkitimiĝi je la svarmantaj radikrimoj (»abortaj rimoj« laŭ la termino de la Parnasa Gvidlibro), en kiuj rimiĝas nur la radiko de la vorto, dum la finaĵoj estas malsamaj tekz.: nudaj — nuboj; lampoj — vanta; adulta — indulge; elfluas-okuloj...). Eble en la bulgara poezio tiu ĉi licenco estas familiara; tamen en la poezio Esperanta ĝi estas neimitinda. (Pu.)

ESPERANTISTA VIVO

Mortis Anežka Kašparová, patrino de fervora membrino de E K en Hradec Králové, la 24. XII. 1950.

Mortis Jan Pola, fervojisto en p., membro de E K en Brno, la 14. IX. 1950.

La familioj akceptu niajn sincerajn kondolencojn!

Patro de nia prezidanto Antonín Malík mortis antaŭ unu jaro, la 18-an de jan. 1950. La filo honorigas la rememoron per sekvantaj versoj:

Fidela paro

Donu al mi manon — diris li
Korcn mian prenu — diris ŝi
Vi estas proleto
Mi proletino
Ĉu tio estu de l' vivo fino?
Kaj la vivo fluis, batis kaj karesis
Kia estas vivo ili ne forgesis
Pezo estis vere de l' vivo la ĉaro
Sed neniam falis la fidela paro
Kvindek jarojn kune
Kaj ne oportune
Poste nur morto disigis
Kion la amo kunligis

Al gratulintoj ekaze de sia 50-a naskiĝtago dankas prez. Adolf Malík per versoj sekvantaj:

Min salutis Abrahamo »forte — elegante« min ŝojigas Via amo bonon dezirante	Danku al Vi kamaradoj pro la bondeziroj Post venontaj kvindek jaroj ĉu estos aspiroj?
Ne forgesis min konatoj venis cent gratuloj skribis al mi la gefratoj kaj kunlaboruloj	Nia firma kunlaboro longe, daŭre floru ke ni ĉiam en humoro la graniton boru

Vivu internaciismo
en frateca rondo
post malvenko de faŝismo
vivos nova mondo

Edziĝo. Ida Algerová kaj Frant. Pázler en Doudleby n. O. la 11-an de novembro 1950.

Edziĝo. Bohuš Zýka el Plzeň kaj Marie Petrová la 27. X. 1950 en Liberec.

Edziĝo. Adolf Malík kaj Adina Šittová, la 16. XII. 1950 en Praha.

Edziĝo. Vladimíra Zachovalová kaj Frant. Sudek, ambaŭ membroj de E. K. en Hradec Králové, la 23. XII. 1950.

Edziĝo. Zdeňka Hníková kaj Karel Kopecký, faka instruisto en Úpice la 1. I. 1951.

Ĉiuj novaj geedzaj paroj akceptu niajn bondezirojn!

La redakcio kaj la Centra Komitato deziras al ĉiuj niaj membroj sukcesan novan jaron! Ni ĉiuj laboru ankoraŭ kun pli granda fervoro je tria jaro de la Gottwaldaj jarkvino.

*

Propono de Esperanto-stenografio. Sistemo Herout-Mikulík, adaptita al Esperanto de Adolf Staňura. Represo el »Esperantista«, 4 paĝoj. Por 3 Kčs afrankite liveras librovendejo de EAĈSR.

Mendu la belan libreton **Urbo sub signo de fajro** de Marie Majerová en bona traduko de Božena Vlčková. Po 32,50 Kčs afrankite.

KORESPONDI DEZIRAS

J. Memelink, Tukseweg 84, **Steenwijk** (Nederlando).

f-ino Gerry Leeuw, Irisstraat 20, **Steenwijk** (Nederlando).

Jiří Mošna, Českých bratří 668, Jičín kun tuta mondo.
Stanislav Holíš, Kokory u Přer., Jas, n. p., kun membroj de Skolta Esperantista Ligo.

Hristo Tonev, str. P. Volov 32, **Kolarovgrad** (Bulgario).
Zdeněk Vojtek, Hrnčířská 197, **Gottwaldov** kun gesamid. de la tuta mondo, intš. pm.

Tomáš Adamec, Domov prům. mládeže, **Gottwaldov** XI-332 kun tuta mondo.

Vojtěch Voznica, Rudé nám. 30, **Brankovice, ĈSR.**

Frant. Patera el Cheb transloĝiĝis al **Hořice v Podkr.**, str. Ĉsl. armády 1027 (Panar). Ĉiuj liaj korespondantoj bonvalu skribi al lia nova adreso!

Ludvík Málek, **Vápenný Podol, ĈSR**, por 50 uzitaj poŝtmarkoj de la tuta mondo sendos la saman kvanton de p. m. ĉeĥoslovakaj.

Teruhiko Uesaka, 3, Kitabatake-Naka 2, Abenoku, **Osaka**, Japanio kun esperantist(in)oj kuracantaj sin de ftizo.

Jungo Ikesita, 24-jara gaja junulo, n-o 3, Taĉibanadori — 6, Niŝinariku, **Osaka**, Japanio, interŝanĝas poŝtkartojn, let., pres., fabrikas saŭcojn, vinagron, spicojn.

F-ino Nina Kaneli, bul. Kl. Gottwald 61, **Sofia C**, Bulgario, kun sportisto.

Librovendejo de EAĈSR ofertas

Majerová: Urbo en signo de fajro (2,50)	30,—
Lad. Krajč: Učebné texty pro kursy (2,50)	20,—
J. Šupichová: Hovoříme esperantsky (2,50)	28,—
J. a K. Filipové: Velký slovník česko-esperantský (11,-) 390,—	
H. K. Bouška: Esperanto - jednotné jazykové pojítko národů. Krátké uvedení do esperanta. 10 ex. ..	8,—
E. E. Collinson: Esperanto a jeho kritické	2,—
Dr. St. Kamarýt - Dr. T. Pump: O zkouškách z esperanta	10,—
Dr. T. Pump: Česká a slovenská literatura v esperantu	2,—
Esperanto-Schlüssel (německý Klíč esperanta)	1,—
J. a K. Filipové: Kantareto (2,50)	45,—
Teksto de kantoj, prezentitaj dum Esperanto-kongreso en Brno (por klubaj artvesperoj)	6,—
Multobligitaj tekstoj de operoj, disaŭditaj de Verda stacio en Praha:	
Najado	20,—
Vendita fianĉino	10,—
Aliĝilo al Esperanto-kurso 100 ekz. (4,—)	35,—
Atesto pri kursfina ekzameno	4,—
Propaganda afiŝeto multkolora	3,—
Kartona afiŝeto (1,50)	5,—
Propaganda afiŝo 41×30 cm - kun libera spaco por anonco de kurso ktp.	2,—
Stacidoma tabulo lada ESPERANTO-INFORMO, uzebla ankaŭ por klubejo (6,—)	100,—
La sama, tomte difektita (6,—)	50,—
Leterpapero kun koverto	1,—
Leterpapero kun koverto aerpoŝtaj	1,50
Poŝtkarto	—,30
Poŝtkarto kun portreto de Zamenhof (Bartošik)	1,—
Novjara poŝtkarto de Bartošik	1,—
Emajlita ŝildeto ESPERANTO PAROLATA 14×5 cm (4,—)	30,—

Senpage al eksterlando:

Konstitucio de Ĉeĥoslovaka respubliko
Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio.

Al la prezo aldonu afrankon, notitan inter krampoj. Kiam ne estas notita, tiam minime 80 helerojn. Plej simpla mendo per poŝta pagilo nro Č 12.371 Svaz esperantistů, Praha.

Th. Carta: Esperanto-lingvo vivanta.

La problemo pri internacia lingvo ne estas pure lingvistika, sed ankaŭ, kaj eble plej precipe, socia. La perfekteco tie ĉi konsistas malpli en la lingvo mem ol en la plena akordo de tiuj, kiuj ĝin uzas.

Krei universalan lingvon a priori postulus unue — se tia kreado estas io alia ol simpla ludo — detalan, zorgan, precizegan klasifikadon de la homaj scioj, kies esprimilo estus tia lingvo. Sed tiu ĉi klasifikado malproksimiĝas despli, ju pli vastiĝas la kampo de la scienco, ju pli multiĝas sur tiu ĉi kampo novaj vojoj, kiuj siavice disdividiĝas en disvojoj, ĉu inter si paralelaj, ĉu interplektitaj.

Unu el la meritoj de D-ro Zamenhof estas, ke li tute alie komprenis la problemon kaj ke ĝian solvon li serĉis a posteriori. Li ne kreis lingvon: li eliris elementojn de sia lingvo el la jam ekzistantaj lingvoj, kies sintezo ĝi estas. Se ni komparas la lingvojn kun fortoj, lia lingvo estas »rezultanto« de tiuj ĉi fortoj.

Sed kial li tiamaniere konsideris la demandon? Tial ke, anstataŭ serĉi ian lingvon por la plezuro ĝin kombini pli malpli sukcese, li serĉis antaŭ ĉio kaj super ĉio nur traduki senpere la ideojn, kiuj plenigis lian animon tiel, ke lin komprenu la plej granda nombro da homoj, liaj »fratoj«. El la koro venas la altaj pensoj; tiujn ĉi grandanimajn pensojn, tiun ĉi profundan amon al la homaro, tiun ĉi ardan deziron alproksimigi la regnon de la paco, ĉion tion li volis per ĉiuj siaj fortoj konigi, komuniki al ĉiuj, kiaj ajn estu iliaj lingvaĵoj. Por li la lingvo estas nur ilo; sed precize el tio konsistas la intima originaleco, la eksterordinara indeco de la lingvo, tiel ke — ilo forĝita por difinita celo: praktika utiligado — ĝi tuj kaj plene taŭgas. La perfekteco de ia ajn instrumento kuŝas ja en la perfekta adaptado al ĝia funkciado, kiun ĉiam celas la bona verkisto.

Komprenigi al multaj homoj tion, kio ŝprucis el lia koro, traduki ideojn, ne simple vortojn, jen la tasko, kiun prenis sur sin D-ro Zamenhof en la ĝojo kaj doloro de la kreado. Ĉar tiel li komprenis sian taskon, li povis nur forĉeti ĉian sistemon a priori, kiu malproksimigus lin de la celo; al plie — ne nur sperta gramatikisto kaj poligloto, sed »apostolo« — devis eltrovi ion tute alian ol simple lertan kombinaĵon de vortoj kaj de gramatikaj formuloj, ion tute alian, t. e. lingvon, idon de ideo, posedantan propran ekziston, propran animon, vivantan lingvon.

Jen, kvankam la lingvo estas rimarkinda laŭ aliaj ecoj, la vera fondo de ĝia tuta forto, jen kial kontraŭ ĉia alia sistemo ĝi konservas kaj konservas sian superecon.

Sed ĉu el la konstato de tiu ĉi fakto rezultas, ke por la esperantistoj estas nepra devo akcepti de tiu, kiun ili nomas »maĵstro«, ion alian ol la lingvon mem, kiun li donis al ili? Ne, tute ne! D-ro Zamenhof deklaris insiste, ke »esperantistoj estas ĉiuj, kiuj scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj ili ĝin uzas«. Se, laŭ deveno, Esperanto ne estis neŭtrala lingvo, t. e. lingvo indiferenta al ĉia ajn socia, politika aŭ religia koncepto, tia ĝi fariĝis fakte kaj laŭ la konsento mem de ĝia aŭtoro. Eĉ, se la animo ŝanĝiĝus, aŭ ŝanĝiĝis, tio nenion forprenis el la forto de la lingvo: la vivo ĝi konservas, kiun ĝi ricevis je sia naskiĝo.

Cetere laŭ alia vidpunkto ankaŭ Esperanto estas tre vivanta lingvo. Ĝi estas nun legata, skribata eĉ parolata de multe pli da homoj, ol kelkaj aliaj vivantaj lingvoj aŭ

dialektoj; ĉiuj, kiuj ĝin uzas, malgraŭ la diverseco de la naciaj lingvaĵoj, uzas ĝin same.

Oni riproĉis al Esperanto, ke ĝi estas arte farita lingvo! Sed ĉiuj niaj civilizitaj lingvoj estas je tre alta punkto artefaritaj kaj fariĝas tiaj ĉiam pli kaj pli sub la potenco influo de inteligenta volo. Inter Esperanto kaj la tiel nomitaj naturaj lingvoj la diferenco estas ne je naturo sed nur je grado.

Esperanto estas komuna lingvo, kiel estas ĉiu lingvo literatura, aŭ pli ĝuste lingvo uzata de kulturitaj klasoj interne de la landoj kiuj uzas saman lingvon; sed Esperanto estas komuna inter popoloj, kies lingvoj estas tre diversaj. Tie kuŝas certe la sola vera danĝero por internacia lingvo, kiu riskas sub la nacilingvaj influoj difektiĝi kaj disfali en dialektojn. Sed ĉar Esperanto estas lingvo precipe legata kaj skribata, lingvo por ĉiu la dua, sekve lernita, ne tre verŝajna estas naskiĝo de dialektoj. Cetere la esperantistoj antaŭvidis la danĝeron kaj kontraŭstaris ĝin per la kreado de Lingva Komitato kaj Akademio, kies ĉefa se ne sola tasko estas: konservi la unuecon, purecon de la lingvo, akceptante novan vorton, novan esprimmanieron nur, kiam, ne kontraŭfundamenta, ĝi estas jam internacie komprenata kaj sufiĉe ĝenerale uzata.

La esperantistoj estas konvinkitaj, ke ili venkos ĉiujn mokojn de nesciuloj kaj ĉiajn malfacilaĵojn, kiujn ili survoje renkontas. Ili posedas multajn gazetojn kaj revuojn; ili havas malantaŭ si jam tre riĉan, tre diversan literaturon, kiu tamen estas vere unu, dank' al la fideleco, kiun ili fidele konservas al sia fundamenta libro, la »Fundamento«, kie D-ro Zamenhof, por tiel diri, koncentrigis sian lingvon: tradicion ili do havas. — Multaj internaciaj kongresoj pruvis plie la praktikan taŭgecon de ilia lingvo kiel parolata lingvo, kiel oratora lingvo.

La esperantistoj ne diskutas sian lingvon; ĝin ili uzas. Ili ne dubas, ke fine ĝi enpenetros en la ĝis nun plej malfavorajn mediojn tial, ke utila al ĉiuj ĝi estas al neniu malutila. Respektante la naciajn lingvojn, kies purecon ĝi fakte ŝirmas, Esperanto ofendas nenion respektindan senton.

La firmeco de ilia konvinko, de ilia sintenado estas forto kaj garantio de l' fina sukceso.

Predmluva k učebnici »Cours Pratique d'Esperanto«, Paris, 1925.

Zamenhof kuracisto. (E. Privat: Vivo de Zamenhof. 1920.)

Zamenhof revenis post kvarjara restado en Grodno Varsovia en 1898. Li enloĝis kun la siaj en malriĉa strato de l'hebrea kvartalo Ulica Dzika 9. Ĝis la milito li restadis tie. Kiel okulisto, li komencis tre malkaran praktikadon. Klientoj pagis nur kvardek kopekojn, kelkaj eĉ nenion. Sed kvankam tre ŝparemaj, la hebreoj ja malŝatas ŝuldojn. Ordinara okulistoj postulis grandajn sumojn. En riĉaj salonoj ili loĝis lukse. Tial multaj homoj eĉ preferis iri ĝis blindeco kun malsano de l'okuloj. Nun alvenis popola kuracanto. Al multaj li eĉ savis vidon. Baldaŭ lia atendejo enpleniĝis de mateno al vespero. Li fariĝis vera bonfaranto.

Amike li kliniĝis super lacaj laboristoj kaj palaj kudristinoj. Sperto kaj studado lin estigis baldaŭ rimarkinda specialisto. Tiel li vivadis ĝis la morto, tre modeste, tre malriĉe, for el ĉia lukso. Per penado ĉiutaga la premantaj zorgoj malaperis. Sed ankaŭ maloftiĝis tempo libera por pli alta celo. (Iam en amerika urbego, post parolado pri verko de Zamenhof al junaj laboristoj, hebrea knabo el Varsovio min demandis: »Ĉu estas tiu sama Zamenhof, la bonkora okulisto de la strato Dzika?«)